

POLA ESPERANTISTO

JARO XXII. * MARTO 1928. * N-o 3.



ROK XXII. * MARZEC 1928. * Nr. 3.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

ANONCOJ:

1 strona	Zł. 60.—	1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 strony	„ 32.—	1/2 paĝo	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—	1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—	1/8 paĝo	„ 10.—

ATENTU!

KUN JANUARA NUMERO DE NIA REVUO NI
MALFERMIS LA FAKON „KORESPONDADO“.
ANONCETO DE 10 VORTOJ (krom adreso) Zł. 1.

TRESĆ — ENHAVO:

TADEUSZ HODAKOWSKI: JUBILEO DE PROF. BUJWID. —
MIECZYŚLAW KAUS: PRI LA TIEL NOMATA „SPIRITO DE
LA LINGVO“. — POLUJO EN CIFEROJ. — SLAVO: NI KAJ LA
ALIAJ, — S. GRENKAMP: LA VOJO AL MODLINGVO. — DRO
CZUBRYŃSKI: ESPERANTO KAJ INTERLINGUA. — J. DRA T-
WER: EL LA NOTLIBRO DE SAMIDEANO. — II. TUTPOLLANDA
KONGRESO DE ESPERANTO. — ZJAZD MIĘDZYN. DELEG. TOW.
LOTN. W WARSZAWIE. — ESPERANTO-MOVADO. — TRADUKA
KONKURSO. — ALVOKO. — BIBLIOGRAFIO. — NEKROLOGO. —
ADMINISTRACIAJ SCIĜOJ.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXII. JARO.

KRAKÓW
MARZEC 1928 MARTO

Nr. 3. N-o.


JUBILEO DE PROF. BUJWID.

Korifeo de la Esper.-movado en Polujo fame konata en-kaj eksterlande scienculo Prof. Dr. Odo Bujwid festis antaŭ kelka tempo sian 70-an naskiĝtagon. Oni ne povis pli frue sciigi legantaron de Pola Esper. pro komplikoj de la afero, ĉar nia Estiminda Jubileulo estas ankaŭ redaktanto de Pola Esper. Nun tamen post forigo de tiuj malfacilaĵoj ni esprimas al Li tutkorajn kaj plej sincerajn bondezirojn kaj ĉe tiu okazo ni publikigas kelkajn biografiajn datojn favore sciigitajn de Lia Altestimata Edzino, pro kio ni ŝin ĉi-tie tre dankas.

En la nomo de la Redakcia Komitato

Dro I. Rosenstock,

Li naskiĝis 30. de nov. 1857 kaj ĝis la deka jaro de sia vivo li restadis en Wilno, kie ekloĝis liaj gepatroj, ambaŭ devenantaj el Litovujo. Lia patro naskiĝis en ĉirkaŭaĵo de Krože kaj Rosienie, konataj pro kruclajoj de senbrida rusa soldataro kontraŭ la sendefenda loĝantaro. La patro, Feliks, frekventis universitaton en Wilno kaj vigle memoris la malnovajn ĝiajn brilajn tra-



diciojn. Pro partoprenado en la ribelo en j. 1863 li perdis ŝtatan okupon, poste li translokiĝis kun familio al Varŝava, kie Odo finis gimnazion, kiel privatstudento, ĉar pro manko de rimedoj li frekventadis gimnazion nur ĝis la 6. klaso. En gimnazia lernado ne malgranda malhelpo estis lia tro insista sin okupado pri hemio kaj mikroskopio, kiuj forprenadis tro multe da

tempo de ĝusta lerneja laboro. Sed tiuj komencoj de naturaj studoj poste

tre utiliĝis dum universitataj studoj. Unuaj disertacioj sciencaj estis skribitaj jam sur universitata benko, el kiuj unu estis premiita per ora medalo de medicina fakultato kaj rekomendita kiel lernolibro de kuracista mikroskopio, por dua el fako de kuracista ĥemio li ricevis arĝentan medalon. Baldaŭ post fino de medicinaj studoj en 1885 protektita de prof. Chałubiński kaj stipendiita de Kaso de Scienca Helpo nom. Mianowski B. veturas Berlinon, por aŭskulti unuan kurson de bakteriologio ĉe prof. Koch. Post reveno al Varŝava B. fondas la unuan bakteriologian laborejon por kontinui memstarajn esplorojn kaj instrui kuracistojn kaj medicinstudentojn pri bakteriologio. Sed jam sekvantan jaron la famo de eltrovo de Pasteur venigas la junan adepton de bakteriologio al Parizo, kie ĉe la eminenta esploristo li lernas la metodon de profilakta kontraŭrabia kuracado. Tiu metodo vekis tiam dubon en la tuta kuracista mondo, estanta tiam sub la influo de germanaj profesoroj kaj precipe de prof. Billroth. En Varŝava post reveno el Parizo B. fondas le unuan, ekster limoj de Francujo, instituton de kontraŭrabia inokulado laŭ la metodo de Pasteur. Nelonge poste B. estis vokita kiel profesoro al la Krakova universitato, kie li prelegis higienon ĝis la j. 1916. Baldaŭ post alveno al Kraków li partoprenas aktive ĉe la aranĝo de la urba akvokonduko kune kun Rotter, Ingarden k. geologo prof. Zaręczny La krakova akvokonduko estis fordonita por publika uzo en j. 1899. Prof. B. malfermas ankaŭ en Kraków Kontraŭrabian Instituton kaj samtempe li okupiĝas pri produktado en Varŝava kaj en Kraków de kuracaj serumoj, precipe de serumo kontraŭdifterita. La difterito forrabadis tiam nur en Galicio mem, laŭ raportoj de la Landa Konsilantaro de Saneco, meze 13,000 da homaj vivoj jare. De kiam oni komencis aplikadi la serumon, tiu cifero malgrandiĝis ĝis 3.000, tiel ke ĉi tie multe pli evidente ol ie ajn la homaro spertis la bonfaran influon de novaj kuracaj metodoj, apogitaj sur bakteriologia bazo. El aliaj esploroj de bakteriologia fako prof. B. laboris pri tuberkulozo ĉe homoj kaj dombestoj kaj faris multajn laborojn, celantajn kontraŭbatalon kontraŭ tiu ĉi malsano. Li proponis inter aliaj metodoj de kontraŭbatalado kontraŭ la brutaj tuberkulozo aplikadon de ĝeneralaj inokuladoj diagnozigaj helpe de tuberkulino. Tio okazis jam antaŭ pli ol 30 jaroj kaj tiu ĉi metodo fine nun komencas esti ĝenerale uzata.

Koncerne sociajn laborojn oni devas mencii, ke prof. B. kune kun kelkaj bonvolemaj homoj fondis la unuan en Polujo virinan gimnazion, el kiu poste eliris granda aro da virinoj rajtigataj studi en universitato. La unua peto al la Konsilantaro de la urbo Kraków koncernanta allason de virinoj al vivo sur kampo politika, multnombraj prelegoj kaj kunvenoj de virinoj por egalrajtigi ilin en politika vivo kun viroj eliris ankaŭ el la domo de geprofesoroj Bujwid kaj akiris varman helpon de prof. B. Ĉi tie ankaŭ apartenas laboroj en la kultura direkto, kunlaboro kun Asnyk en TSL. (Societo de Popola Lernejo), kunlaboro kun universitata junularo por fondi societon de Popola Universitato, kunlaboro en kreado de Pola lernejo en Biała, de Pola Domo en Moravska Ostrava, multnombraj popularaj prelegoj en la tuta lando pri plej diversaj temoj de la scienco, plejparte pri higieno.

Dum la granda milito prof. B. gvidis profilaktajn inokuladojn

kontraŭ infektaj malsanoj en la aŭstria armeo, kiel direktanto de aparta militista laborejo, k. a. La laborejo militista, kiu estis transdonita al dispono de prof. B., ne estis taŭga por plenumi la inokuladojn, kaj oni tion ĉion devis fari en lia laborejo privata en Kraków, je kio konsentis la ministraro en Vieno, sed kion ne volis aprobi la militista intenden-tejo en Kraków kaj kio estiĝis sekve fonto de multnombraj malagrablaĵoj por prof. B., des pli, ke la polaj legionoj ricevadis la serumojn tute senpage.

En la pola armeo prof. B. organizis higienan laborejon de militista sanitara instituto en j. 1921-2 kaj gvidis kursojn instruajn kiel kolonelo-kuracisto. Poste li ekŝiĝis el militistaro al rezervo kaj emeritiĝis ĉe la universitato. Do li havas nun pli multe da tempo kaj eblo oferi sin al laboro por disvastigado de helplingvo, kiu delonge allogadis lin, kiel nepre necesa en internaciaj rilatoj, por ilin plifaciligi kaj simpligi.

La interkonatiĝo kun Zamenhof, kiu estis lia kolego en la Varŝava universitato depost la dua jaro de medicinaj studoj ne multe helpis lin pri tio. Kiel ni supre vidis, la studoj pri bakteriologio, tiam en Polujo preskaŭ nekonata, ĉar eĉ eksterlande ne estis loko, kie oni povus ĝin studi, forprenadis lian tutan atenton kaj tutan disponeblan tempon kaj la okupoj ligitaj kun katedro de higieno, krom tio multaj sociaj laboroj en tiom neglektitaj fakoj en la lando okupis la reston. Pri la unuaj pro-gresoj de Zamenhofs ideoj, precipe ĉe internaciaj kongresoj eksciis B. tiam, kiam la iniciatintoj de kongreso en Krakovo D-o L. Rosenstock, s-o Rudnicki kaj Kriss ekproponis al li partoprenadon en la laboroj de kongreso. Ekmemoris tiam B. tiun ĉiam enpensigintan kolegon, kiu en la kolegaro universitata distingiĝadis per tio, ke sur liaj lipoj nur tre malofte aperadis rideto konvena al juneco. Stigmo de la granda penso, kiu ekre-gis lian tutan estaĵon, prezentiĝas nun nur kiel rememoro, sed tiutempe eble eĉ ofendadis kelkiujn pro nekomprenebleco kaj ne allasadis penson pri alproksimiĝo. La VIII. internacia kongreso en Kraków alproksimigis la unuan fojon ambaŭ kolegojn. Unuafoje prof. B. konvinkiĝis tiam, kio povas estiĝi lingvo genie pripensita de ĝia kreinto en plej etaj detaloj.

Kaj tiu serioza, ĉiam enpensiginta kolego baldaŭ post okazinta kon-greso permesis ekkoni profundecon de sento. Laŭ rakonto de prof. B. Zamenhof estante forveturonta el Kraków, premis lian manon por adiaŭo kaj elparolis tiujn ĉi vortojn: „Mi dankas Vin amata kolego pro tiu kon-greso, al kiu egalan mi neniam en mia vivo travivis. Tiu kongreso estas al mi neniam forgeŝebla, ĉar mi ĝin travivis en tiu malnova agrabla Kra-kovo — nelonge mi jam verŝajne vivos, sed egale belajn impresojn certe mi neniam havos“. Kaj ĉi tie ekvidis prof. B. en okulo de Zamenhof larmon de vera kortuŝo.

Nun prof. B. aktive partoprenas en la Esper.-movado, estante re-daktanto de Pola Esper., laborante kiel prezidanto de Pol. Esp. Deleg., kiel membro de K. R. en Genevo. Kiel prezidanto de la Universala Scienca Esperanta Asocio (ISAE), kiel agema ano de la tutmonda Espe-ranta Kuracista Asocio (TEKA) kaj kunlaboranto de ties faka organo „Internacia Medicina Revuo“, partoprenante landajn kaj internaciajn kon-gresojn en Wien, Edinburgh, Gdańsk, Toulouse, prelegante Esp. en la Varŝav'a universitato, klopodante kun sukceso pri materiala helpo por disvastigado de ideo de helplingvo en Polujo, kiu estis la lulilo de nia kara Esperanto.

Tad. Hodakowski.

PRI LA TIEL NOMATA „SPIRITO DE LA LINGVO“.

Niaj kontraŭuloj ofte riproĉas al ni, ke Esperanto, post kiam ĝi fariĝos propraĵo de multaj popoloj, perdos la unuecon, ĉar estos konstante sub la influo de naciaj lingvoj, inter kiuj estas grandaj diferencoj en la maniero de la esprimado de identaj pensoj. Sekve, ĝi ĉesos esti lingvo internacia.

Laŭ ili la spirito de ĉiu nacia lingvo konsistas ne en simpleco kaj logikeco, per kio fieras la esperantistoj, sed en tio, kio respegulas la mensan laboron de popolo en ĝia interna socia vivo, ĝiajn inklinojn al vortaj sintezoj, metaforoj, simboligadoj. En naciaj lingvoj estas verkoj preskaŭ netradukeblaj, se en ili la formo ludas la ĉefan rolon.

Jen por ni, esperantistoj, la problemo serioza, kiun oni ne povas neglekti. Esperanto ne eniris ankoraŭ en la fazon de plena disvolviĝo kaj ne estas de ĉiuj popoloj elprovita.

Ni bone scias, ke ankoraŭ nun aperas de tempo al tempo esperantaj verkoj, super kiuj iafoje oni devas pacience mediti por diveni, kian penson kaŝas tia aŭ alia frazo.

Sperta esperantisto respondas tiam, ke la aŭtoro ne sufiĉe ankoraŭ asimilis al si nian lingvon. Tio estas vera. Tamen por la samlandanoj de la aŭtoro tia „stilo“ estas tute komprenebla. K j povos en la estonteco okazi, kiam oni surŝutados nin per internacia literaturo, ke oni havos naciajn esperantajn stilojn, kiujn eviti estos malfacile aŭ tute neeble.

Tiaj kaj similaj konsideroj devigas nin iom pli detale analizi la problemon por juste juĝi la meriton de la supra riproĉo.

Antaŭ ĉio ni respondu al la demando: kio estas la „spirito de la lingvo“?

La nunaj lingvoj, dialektoj, idiomoj, kiuj estas tiel multenombraj sur la tera globo disvolviĝadis laŭgrade, en la kondiĉoj diversaj. Ĉiu penso kaj sentimento ricevis specifajn vortajn esprimojn. La lingva evoluo ne estis konscie gvidata, sed spontane kaj arbitre progresanta. Do per si mem kreiĝis formoj, kiel produkto de hazarda mensa procedo.

De tie aperis por la estontaj generacioj malklaraĵoj ofte nelogikaĵoj, ĉar oni forgesis, kiamaniere formiĝis certaj vortoj kaj frazoj, esprimantaj ian komplikitan animan travivon.

Gento aŭ nacio, vivanta en egalaj kondiĉoj tradicie heredis de siaj prapatroj la lingvon, kiu ligis ĝiajn membrojn. Ilia animo kreskis kune kun la komuna maniero de parolo. Iliaj sentimentoj de amo kaj malamo havis pretajn, respondajn voĉsimbolojn. Kaj kontraŭe: la prononco de ili elvokadis ĉe proksimulo pli aŭ malpli respondajn animajn agordojn.

Tiel estas ankaŭ en la nuna tempo. Ni, heredintoj de tio, kio en niaj nacioj estas lingva perilo, kreiĝanta en la tempoj de niaj prapatroj, ne povas nin deŝiri de la viva arbo, kies branĉoj ni estas.

Por subtila orelo ĉiu arbo havas specifan sonon, kiam blovas la vento. Nacia lingvo similas al la sonoj de tiuj arboj.

Izola vivo de gentoj kaj poste iliaj politikaj organizoj kaŭzis, ke

lingvaj diferencoj parte malaperis, parte profundiĝis. Politikaj limoj fariĝis en la antikvaj tempoj muroj, dividantaj homojn. Por multaj tiuj, kies parolo estis nekomprenebla, ili estis „mutuloj“.

Sed venis tempo de ĉiam pli ofta interkomunikiĝado inter nacioj. Oni rimarkis, ke inter ili kaj iliaj lingvoj estas ofte komunaj radikoj, similaj trunkoj kaj branĉoj. Kaj iafoje iliaj folioj kaj floroj estas tiel frapante egalaj, kvazaŭ ili kreskus sur la sama tero.

Oni konvinkiĝis, ke malgraŭ denatura aŭ historie disvolviĝinta diverseco ekzistas inter la tuta homaro ankaŭ denatura aŭ historie disvolviĝinta simileco.

Cetere, nomoj miksiĝas. Ni nunuloj, ne vivas en la samaj kondiĉoj kiel niaj antikvaj antaŭuloj. La tiel nomataj „tipoj“ de homoj grade malaperas.

La nacianojn ligas nun tradicio kaj komuna lingvo, ofte ankaŭ komunaj aspiroj. Tamen la „komuneco“ de aspiroj estas tiel relativa, ke iafoje oni ne scias, ĉu ni unu al alia estas fratoj, ĉu malamikoj.

Antaŭe, kiam rilatoj inter diversaj nacioj estis maloftaj aŭ neniaj, la aspiran diversecon oni povus konsideri kiel internan malpacon, post kio ĉio ŝanĝiĝas kaj denove ekregas harmonia vivo.

Nun estas alie. Precipe post la genia kreo de Esperanto, kiel lingvo internacia, ni vidas, ke multaj branĉoj de grandaj kaj malgrandaj naciaj vivaj arboj komencas sin interplektadi. Ke dum ilia florado la semoj, nutrataj de malproksime cirkulanta suko, falas sur fremdan teron kaj kelkaj el ili burĝonas kaj elkreskas kiel novaj arboj.

Kvankam la subite aperinta uragano provas de tempo al tempo disligi la kunigitajn branĉojn, eĉ ilin rompi, tamen la eltrovita rimedo por la diskreskado de branĉoj kun des pli granda forto efikas, kiam la ventego trankviliĝas kaj kiam la suno denove ekpendas super la tero kaj varmigas per siaj radioj ĝian surfacon.

El la supra geneza kaj alegoria kompreno de la „spirito de la lingvo“ la esperantistoj povas eltiri konsekvencojn por respondi al la riproĉaj demandoj: ĉu Esperanto povas havi sian „lingvan spiriton“ kaj ĉu oni devas timi, ke ĝi disfalos en dialektojn.

Ni havas du argumentojn por la respondo: 1-a la neordinara, mirinda eble logike esprimadi siajn pensojn en Esperanto kaj 2-a la tradicio de esperanta stilo, apogita sur la modelaj esperantaj verkoj.

Se iu komencas verki esperante kaj faras erarojn sub la influo de sia nacia lingvo, tio signifas, ke la aŭtoro ne kapablas ankoraŭ rimarki diferencon inter la penso kaj ĝia vorta esprimo. Ekzemple — oni ne povas traduki la francan ordinaran frazon: „comment vous portez-vous?“ per „kiel vi portas vin“ aŭ la samon el la pola lingvo: „jak się masz?“ per „kiel vi vin havas?“, ĉar ne-franco kaj ne-polo ne komprenus aŭ kunpeno komprenus tian tradukon.

El tio evidentiĝas, ke la logika pensado estas bezona por ĉiu, deziranta korekte paroli esperante kaj necesa por ĉiu kreanto de novaj, neordinaraj frazoj, esprimoj, eĉ apartaj vortoj.

Sed, efektive, ne ĉiu estas kapabla logike pensi pri la maniero de

sia parolo. Ofte la „pura ideo“ tiel absorbas la parolanton, ke al li neeble estas turni eĉ ioman atenton al la formo de liaj pensoj. Tiam bona aŭ malbona parolo dependas sole de bona aŭ malbona pasiva asimilo al si de la lingvo parolata.

La sperto nin instruas, ke la ĉefa motoro de korekta kaj flua parolado estas kapablo de senmedita kaj senpera esprimado de siaj pensoj en la lingvo, al kiu oni kutimis. Kaj kutimi povas nur tiu, kiu ofte havas okazon ekzerciĝadi en iu lingvo laŭ bonaj modeloj.

Se ĉiu novico en Esperanto — indiferece al kiu nacio li apartenas, — ne prenis por la komencaj legadoj alian libron, ol modelan, kaj antaŭ ĉio la verkojn de nia Majstro, li evitus lingvajn naciaĵojn, kiuj ofte enŝteligas en librojn, skribatajn de nespertaj ankoraŭ esperantistoj.

Dro L. L. Zamenhof, eldonante „Fundamentan Krestomation“, skribas: „...la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene egale; kaj por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistu iaj modeloj, gvidaj por ĉiuj. Tio ĉi estas la kaŭzo, pro kiu ...mi eldonis la Fundamentan Krestomation, kiu povos servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj“.

Ni do vidas, ke Esperanto nur tiam posedos fortan internacian lingvan spiriton, kiam ĉiu esperantisto esprimados siajn pensojn logike, klare, regule kaj antaŭ ĉio modele.

Interne tiu „spirito“ ne estas nova, ĉar ĝi vivas en la samaj homoj, kiuj amas sian patran teron, sian tradicion, sian denaskan lingvon. Ĝi ne venas de ekstere, sed ĝi ekzistas en la koro de tiuj, kiuj etendas siajn brakojn por amika vivo kun la tuta homaro.

Mieczysław Kaus.

POLUJO EN CIFEROJ.

LOGANTARO DE PLI GRANDAJ URBOJ.

Warszawa (en dec. 1927)	1,028.982	Białystok (dec. 1927)	89.405
Łódź (okt. 1927)	580.000	Królewska Huta (sept. 1926)	85.000
Lwów (aŭg. 1927)	237.823	Równe (okt. 1927)	70.000
Poznań (junio 1927)	230.757	Stanisławów (okt. 1927)	67.000
Kraków (okt. 1927)	203.332	Grudziądz (okt. 1927)	57.088
Wilno (okt. 1927)	198.000	Toruń (okt. 1927)	40.000
Katowice (sept. 1926)	118.340	Przemyśl (en. 1921)	48.017
Lublin (junio 1927)	112.222	Kołomyja (okt. 1927)	46.000
Bydgoszcz (julio 1927)	108.982	Grodno (okt. 1927)	46.000
Sosnowiec (okt. 1927)	106.000	Piotrków (dec. 1926)	45.225
Częstochowa (sept. 1927)	93.755	Tarnów (okt. 1927)	45.000

LA SEKSO DE LA LOĜANTARO.
(Stato en la jaro 1921).

Vojevodaj distriktoj	Je 100 loĝantoj	
	viroj	virinoj
Urbo Warszawa	45.1	54.9
Vojev. Warszawa	47.9	52.1
„ Łódź	47.5	52.5
„ Kielce	48.1	51.9
„ Lublin	48.1	51.9
„ Białystok	47.8	52.2
„ Wilno	48.4	51.6
„ Nowogródek	48.1	51.9
„ Polesie	48.5	51.5
„ Wołyń	48.7	51.3
„ Poznań	46.7	53.3
„ Pomorze	47.9	52.1
„ Kraków	47.1	52.9
„ Lwów	47.6	52.4
„ Stanisławów	47.5	52.5
„ Tarnopol	47.8	52.2
„ Śląsk	47.3	52.7

LA NOMBRO DE LA KURACISTOJ.
(en la jaro 1926).

Vojevodaj distriktoj	Ĝenerale	je 10.000
		loĝantoj
Urbo Warszawa	1664	17.8
Vojev. Warszawa	291	1.4
„ Łódź	572	2.5
„ Kielce	343	1.4
„ Lublin	301	1.4
„ Białystok	236	1.8
„ Wilno	313	3.2
„ Nowogródek	84	1.0
„ Polesie	125	1.4
„ Wołyń	166	1.2
„ Poznań	454	2.3
„ Pomorze	138	1.5
„ Kraków	694	3.5
„ Lwów	999	3.7
„ Stanisławów	239	1.8
„ Tarnopol	180	1.3
„ Śląsk	288	2.6
Kune	7087	2.6

Elektoj por la Sejmo kaj por la Senato en Polujo estas kontentiga signo por nunaj pacemaj kaj pacigaj penadoj de ĉiuj nacioj. Dank al la vera politika geniulo Marŝalo Józef Piłsudski pli kaj pli disvolviĝas la ideo de la paca kunvivo kaj pacema kunlaboro de popoloj. La ŝovinista politika partio en Polujo dum la lastaj elektoj perdis sian ĝisnunan forton.

NI KAJ LA ALIAJ.

Al tiu ĉi gazetrubriko, enkondukita de „Heroldo“, kiu kaŭzadis tiom multe da bruoj kaj miskomprenoj bedaŭrindaj en niaj vicoj, ni alĵetas kelkajn komparojn el la krakova „batalkampoj“.

En la krakova universitato estas unua en la mondo lektorado de „Interlingua“. Tio estas „lingvo“ kreita de itala prof. Peano. Ĉe ni ĝin lektoras s-o Jezierski, instruisto el malgranda pola urbeto Lida.

Lian unuan prelegon, anoncitan por „interesiĝantoj pri internacia lingvo“, partoprenis sufiĉe granda nombro de aŭskultantoj... ĉiuj verdsteluloj. Ekvidinte tion, s-o J., eĉ ne senmanteliĝinte, nerveme anoncis, ke li prelegos pri interlingva, unu el 450 projektoj de internaciaj lingvoj kaj petis ĉiujn, ke ili komuniku al li horon kaj tagon de liaj prelegoj.

Memkompreneble ĉiuj „interesiĝantoj pri lingvo internacia“ havas intereson nure por sola praktika tiuspeca lingvo Esperanto kaj ne por iu ajn alia. Neniu do al s-o J. respondis. Finfine unu el aŭskultantoj, volante liberigi la malbonŝancajn prelegonton el krudela al li silento, diris, ke ĉiuj ĉeestantoj venis por prelego de sola praktika internacia lingvo Esperanto kaj tiajn prelegojn kaj kursojn ĉiuj ĉiam partoprenados. Prelegojn pri alia „lingvo“ neniu!

Proksiman semajnon s-o J. anoncis jam prelegon „de lingvo internacia Latino sine flexione aŭ Interlingua, kiu nenion komunan havas kun tiel nomata Esperanto“. Efiko de tiu ĉi anonco estis, ke je prelego venis s-ino J. kaj du verŝajne iaj familianoj... La tria prelego jam tute ne okazis, ĉar eĉ s-o J. ne venis!

Kaj nune pri nia afero en la krakova universitato! Ĉi tie laboras Studenta Esperantista Rondo, kiu responde al prelegoj de Interlingua organizis esperantan kurson. Al kurso de nia lingvo ne sufiĉe reklamata pro manko de monrimedoj, al kurso pagata kaj gvidata nur de studento aliĝis kaj ĝin regule partoprenas 31 personoj. Sapienti sat. *Slavo.*

LA VOJO AL MONDLINGVO.

Dediĉita amike al la aŭtoro de „Ni kaj aliaj“.

Estis dum bela tago en la jaro 19.. en kiu fondiĝis Instituto de Mondlingva Kunlaboro.

Ridetiĝis tage la suno kaj nokte la luno al la feliĉa tero.

En ĉiuj redaktoj de mondlingvaj ĵurnaloj (?) estis festo.

Ripozis la aŭtoroj de ŝanĝemaj kaj plibonigeblaj projektoj...

Estis festo de — Kunlaboro...

*

*

*

Preskaŭ jam unu tutan longan tagon daŭris la idilio, ..

Preskaŭ unu tutan longan tagon silentis en harmonio la anoj de la tute sama ideo.

* * *

Sed subite traventis la aerosferojn stranga komuniko.

La, esperanta (?) radio-stacio de Genevo disanoncis en tutmondon, ke oni kunvokas eksterordinaran kunvenon de la Instituto de Mondlingva Kunlaboro en tre urĝa, grava afero.

— Kio okazis? demandis la festintoj el ĉiuj anguloj de l' terglobo. Sed la radio-stacio ne donis respondon.

* * *

Kaj el ĉiuj anguloj de l' mondo alkuris kaj alflugis la aŭtoroj, kreintoj, projektistoj de l' mondlingvoj al la kunvenejo.

Inter aliaj venis en botoj sepkilometren-portantaj la plenmerita aŭtoro de la renversita a, alradiis el Centra Afriko la honorinda kreinto de la s e s a ĉapelita litero (ĉu vi aŭdas?!) kaj fine la lasta senpacience atendita hinda kreinto de la myltenombro je y. Li malfruiĝis pro malagrabla okazintaĵo: li ne forte ligis sian (jam duan) edzinon al sia aerobiklo (oni diras, ke li intence tion faris.) kaj ŝi (feliĉe por li) enfalis en la maron.

Kunvenon malfermis la konata aŭtoro de Splik per du piedoj kaj du manoj samtempe.

Unugorĝe li estis elektita prezidanto de la kunveno. Li elokvente dankis al ĉiuj, kiuj tiel sincere sukcesis fine unuiĝi. Jam unu tagon, plenan tagon daŭris la konkordo. Certe tiamaniere oni rapide kondukus la aferon al rapida venko, se...

Rideti la luno...

Kaj oni longe diskutis kiamaniere agi kontraŭ la nova ĵus aperinta frenezulo Bo kaj kontraŭ la milionulo Co el Norda Poluso, kiuj ĵus aperigis tre interesajn novajn projektojn de modlingvo...

Amikoj, kiel naiva, infaneca, utopia estas la ideo de tiuj, kiuj pensas, ke sufiĉos hodiaŭ kunigi esperanton kun aliaj nun dormantaj ĉu vivetantaj projektoj, por ke la paco ekregu...

Kaj se morgaŭ iu aperigos ankoraŭ „pli bonan“ projekton, ĉu do rekomenciĝos la historio?

Esperantistoj, amikoj miaj, ni fosu nian sulkon!

S. Grenkamp.

ESPERANTO KAJ INTERLINGUA.

a) FILOLOGIA FLANKO.

(Laŭ broŝuro de Bruno Migliorini el Romo premiita ĉe la IX Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa en 1923).

Atentindaj fariĝis en lastaj jaroj la projektoj de internacia lingvo, kiuj grupiĝas ĉirkaŭ *Academia pro Interlingua*, direktata de konata matematikisto sro Peano en Torino. Laŭ siaj statutoj la Akademio estas scienca societo, kiu ne povas fari propagandon por iu speciala projekto de internacia lingvo; la reguloj de ĝi akceptitaj estas nur konsiloj, ĉar ĝiaj asocioj povas alpreni la sistemon de „interlingvo“, kiun ili preferas. Sekve Interlingua havas duoblan signifon: 1) lingvon internacian ĝenerale

kaj 2) latinan simpligitan (LS). Sed fakte, por la plej multaj el la Akademianoj ne nur Volapük sed ankaŭ Esperanto kaj Ido estas konsiderataj kiel nemodernaj, neprogresintaj formoj de LI: la solvo de la problemo konsistas por ili en la alpreno de la vortoj de latina vortaro ĝis nun vivantaj en la eŭropaj lingvoj, senigitaj de la fleksiaj karakterizoj (ekz. *homine*, ne *homo*). La precipa celo estas la unuavida komprenebleco kaj la celon oni atingos per konstanta proksimiĝo de tiaj lingvoj per komparado, diskuto. Tre ofte kune ekzistas multaj vortoj samsignifaj, kiujn neniu regulo povas forpuŝi, ekz. *expositione* kaj *exhibitione*, *sabato* kaj *saturno die*, *bello* kaj *formoso* aŭ *vulcro* aŭ *venusto*. Ĝi rifuzas en tiaj okazoj ĉian arbitran elekton, lasante al la kaprico de la uzantoj la elekton. („la verkantoj devas konstrui sian propran formon de lingvo“). Sed akceptante nur latinan lingvon kiel bazon de la vortaro, oni tamen trovas multe da vere internaciaj vortoj (aŭ vortradikoj) tute ne latinaj ekz. *cigaro*, *honto*, *juvelo*, *kafo*, *kiosko*, *magazeno* k. t. p. Tiujn vortojn oni tamen akceptas ankaŭ al la vortaro principe, sed kion fari en la okazoj kiom eksplodas la konflikto inter la elementoj latinaj ne-internaciaj kaj nelatinaj tamen internaciaj, ekz. *birra* (biero) kaj *cerevisi*? Vorto *tailleur-taylor* estas pli konata ol latina *sartor*, *hôtel* pli ol latina *hospitale*. Konstrui lingvon, rezignante je konvencia elekto, oni ne povas. Eĉ pli frapanta estas la sensistemo de LS en tiuj sennombraj okazoj, en kiuj la signifo de latinaj vortoj ŝanĝiĝis en la latinidaj lingvoj, ekz. latina vorto *populare* signifas: dezertigi, itala *populare* kaj franca *peupler* signifas: popolplenigi; *uomo*, latina signifas: domo, itala *duomo*, (germana *Dom*) signifas: ĉefpreĝejo, franca *dôme* signifas: kupolon. Oni rimarku tamen, ke la arbitreco, kiun ni allasas, parolante pri konvencio, tute ne estas kaprica kaj kontraŭscienca arbitreco. Ne estas pli „scienca“ solvo akcepti por la ideo „bela“ la vorton *pulcro* aŭ la vorton *formoso*, por la vorto *pensare* la signifon „*vensi*“, aŭ la signifon „*pesi*“, nur en la praktiko estas nepre necese decidi unu, aŭ aliflanke, simile, kiel science estas pli malpli indiferece, ke la aŭtomobiloj cirkuladu dekstre, aŭ maldekstre: tamen en la praktiko estas nepre necese, ke la ŝtatoj precize fiksas unu aŭ alian manieron. La espero, ke la uzado mem povu decidi, ke ĝi sukcesu inter la diversaj formoj aŭ signifoj forpuŝi la malpli taŭgajn, ŝajnas tute iluzia. Oni pensu, kiom da jardekoj aŭ da jarcentoj batalas inter si, en la naciaj lingvoj, formoj signife egalvaloraj antaŭ ol unu sukcesas forpuŝi la alian, ekz. itala *melanconia* kaj *malinconia*, anglaj formoj *he loveth* kaj *he loves*. Vortderivado en LS ne havas propran derivsistemon, t. e. sola maniero koni la samfamiliajn vortojn estas foliumi vortaron por vidi ĉu Latinoj estis kreintaj derivitaĵojn, ekz. *aestate-aestivo*, *animo-animoso*, *auro-aureo*, *bello-bellico*, *bove-bovino*, k. t. pl. Sekve, ĉu la adjektivo de morbo estos laŭ itala, ibera *morboso*, aŭ laŭ franca *morbido*? Kaj se oni akceptus *morbido*, ĉu italo, ibero ne komprenos „delikata“? Estas evidente, ke *doma*, *urba*, *vira* estas unuavide malpli facile kompreneblaj por Latinido ol *domestiko*, *urbano*, *virile*. Sed kontraŭe, mi kredas, ke Slavo, Skandinavo, Japano, nepre preferos lerni nur unu radikon kaj regule formi ĝiajn derivaĵojn. Lingvo, kiu pretendas al normala funkciado, devas havi vorttrezoron konvencie starigitan. Rifuzante ĉian konvencian fiksadon de siaj elementoj kaj de ilia interrilatmaniero, LS ne povas tranĉi

iun el la mil fadenoj, kiuj ĝin ligas al la latina lingvo kaj ne povas regule akcepti modernan materialon, kiu ne trapasis tra latina kribrilo.

b) SOCIA FLANKO.

Mi citis la vortojn de mia roma kolego, kiu bonvolis al mi donaci dum mia ĉeesto en Romo en 1924 sian interesan broŝuron, kiun mi nur povas varme rekomendi al ĉiu samideano por ĝin plentekste tralegi. (Aĉetbla ĉe aŭtoro, Via Alessandro Poerio, 29, Roma, 44. je 1.50 liroj por ekzemplero). Nune mi volas aldoni ankoraŭ kelkajn vortojn koncernantajn socian flankon de Esperanto. LS. aperis en la sama jaro kiel ankaŭ Esperanto. Kaj dum Esperanto travojaĝis triumfe la tutan terglobon, fondante ĉie societojn, enpenetrante en ĉiuj vivkampoj, aranĝante esperantajn, ne nur esperantistajn kongresojn, kreante grandan literaturon dank' al ardo de ĝiaj pionir-j — LS dum tiu - ĉi tempo rezonadis, kiu formo de la vortoj estas plibona, restis en kvar muroj de iliaj teoretikuloj. Kie estas ĝia literaturo? Kie ĝiaj organizoj? Kie la kongresoj? Grandan principan eraron faras LS — anoj ne nur de filologia vidpunkto, sed antaŭ ĉio kaj ĉefe de socia vidpunkto: esperantismo ne estas nur lingvo; ĝi estas antaŭ ĉio socia movado, organizo, nombro, armeo solidara. Lingvo estas facila. Ni eĉ supozu momente, kvankam tio ne estas vera, ke LS aperas pli facila? Kia konkludo de tio? Ne decidas nur lingvo! Oni ellernas eĉ malfacilajn lingvojn, eĉ kelkajn se nepre ili estas necesaj. Decidas organizo kaj solidareco. Se ne ĉiujare, do dum du aŭ tri jaroj aperas ĉiam ankoraŭ novaj proponoj de lingvoj internaciaj, sed iliaj aŭtoroj krom iom da bruo kaj elspezo de mono dum ia tempo nenion akiras. Ili silentiĝas tre rapide. Do ni ne tro zorgu pri la subtilaĵoj filologiaj, sed pli pri la ĉiam novaj kaj novaj organizaĵoj.

Dro Czubryń ki.

EL LA NOTLIBRO DE SAMIDEANO.

Pri mi mem...

Mi estas esperantisto. Antaŭ longa tempo min infektis nekonataj bakterioj de tiu verda malsano. Kiel mi fariĝis esperantisto, estas ne klare por mi, samkiel ofte oni ne povas diveni la kaŭzon de malsano, kies sekvoj estas jam videblaj. La malsano akute ekkaptis min, ne forlasis kaj fariĝis kronika. Ĝi eniris mian menson, korpon, estiĝis neforigebla de mia tuta „mi“. Kaj pasie mi ekamis la alkroĉiĝintan malsanon. Kara akompananto ĝi fariĝis de mia esteco, de revoj nebulaj, stelo brila la vojon al idealoj montranta... Kvazaŭ per forta unua amo de junulo al knabino bela mi amas Esperanton. Kiel solinfano por gehomoj jam nejunaj ĝi estas kara por mi. Ĝiaj sukcesoj estas miaj kaj malvenkoj doloras min. Oni povas nomi min blinda fanatikulo, sed ideo de la lingvo internacia kaj Esperanto estas por mi forte kunligitaj kaj nedisigeblaj. Ĉiuj provoj de reformoj, enkonduko de novaj vortoj kaj formoj nebezonaĵ vundas mian koron kaj minace atencas min... kaj kiam ofte zorgoj kaj klopodoj de l' vivo ĉiutaga donas momentojn ĝenajn aŭ malagrablajn, mi foriras en fantazian landon Esperantujo, kie sub milda lumo de l' verda

stelo mi trovas ripozon kaj pacen. Insiste kaj obstine mi laboras por Esperanto — kaj post jaroj, kiam krepuskiĝos la tagoj de l' vivo kaj estingiĝos la junula fervoro, same diligente, mi — „fosos mian sulkon“..

J. Dratzer, Warszawa.

II. Tutpollanda Kongreso de Esperanto.

Kraków, 27—28, de majo 1928.

Plenumante la deziron de multaj samideanoj kaj speciale de la II. Konferenco de P. E. D. en Warszawa, okazinta en novembro 1927, la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. aranĝas en Kraków dum Pentenkosto t. e. 27 — 28 de majo k. j. II Tutpollandan Kongreson de Esperanto. Tiamaniere post longaj jaroj ankaŭ ni havos nian landan kongreson, kiu certe ĉiujare estos aranĝata. La loka komitato komencis jam preparajn laborojn por certigo de ĝia sukceso per bona kaj taŭga organizo. Ni atendas subtenon en nia laboro de ĉiu samideano en Pollando kaj varme alvokas ĉiun bonvoleman samideanon al kunlaboro. Sed por certigo de la sukceso kaj plifaciligo de la laboro estas necesa multnombra kaj frua aliĝo de la kongresanoj. Ju pli frue ni scios, kiom da ĉeestantoj partoprenos, ju pli frue ni disponos pri necesa mono, des pli impona kaj impresa estos nia Kongreso! Tial ne prokrastu aliĝi kaj pagi la kotizon tuj!

Sube ni donas provizoran programon de la kongreso:

27. V. dimanĉo: 8—10 30 h. Vizitado de la urbo.

11 h. Solena malfermo de la Kongreso kun du referatoj.

13 h. Komuna tagmanĝo.

16 h. Laborkunsido de P. E. D.

28. V. lundo: 8—10 h. Vizitado de la urbo.

9 h. Ekzamenoj.

11 h. Laborkunsido de P. E. D. kaj fermo de la Kongreso.

13 h. Komuna tagmanĝo.

15 h. Ŝipekskurso al Tyniec kaj Bielany.

La loka komitato zorgas pri rabatita fervojbileto kaj malkaraj loĝejoj

Kotizo zł. 5.—

Aliĝojn bonvolu sendi al ĝen. sekr. J. Alfus, Kraków XXII, Aleja Dembowskiego 10.

Prof. Dr. O. Bujwid,
prezidanto.

J. Alfus,
ĝen. sekretario.

1. Jamaliĝis: Prof. Dr. O. Bujwid. 2. Dr. L. Dreher. 3. Dr. L. Rosenstock.
4. J. Alfus, Kraków. (Daŭrigota).

ZJAZD MIĘDZYNARODOWY DELEGATÓW TOW. LOTNICZYCH W WARSZAWIE.

Dla postępu ruchu w kierunku przyjęcia jednego języka porozumiewawczego w lotnictwie zjazd odbyty w ostatnich dniach lutego b. r. może przynieść niezaprzeczane korzyści, gdyż sprawa ta została poruszona na jednym z posiedzeń, jako temat, który nie powinien w przyszłości zejść

z porządku zjazdów, aż wreszcie rzecz sama zostanie pomyślnie załatwioną. Jest bardzo ważną i znamioną okolicznością, że sprawa a dostała się pod obrady; zawdzięczać to należy wytrwałemu poparciu jej przez Prezesa Zjazdu, p. Dra Ignacego Wygarda, który jeden z pierwszych zpośród wszystkich przedstawicieli Towarzystw lotniczych pojął należycie, jak wielką doniosłość mieć będzie dla całego lotnictwa przyjęcie jednego dla wszystkich ludów świata języka porozumiewawczego. P. Dr. Wygard zaproponował prof. Bujwidowi wygłoszenie odczytu na ten temat na jednym z posiedzeń zjazdowych. Odczyt, właściwie krótki referat w języku francuskim o dotychczasowych postępach języka pomocniczego Dr. Zamenhofa, o jego rozpowszechnieniu wśród ludów świata całego, nie wyłączając Stanów Zjedn. Ameryki Półn. ani Wielkiej Brytanji, gdzie już d isiaj rośnie uznanie dla niego z dniem każdym nieledwie, nie mówiąc już o Niemczech, Szwecji, Holandji, Belgji i innych krajach, gdzie potrzeba tem bardziej jest odczuwaną, im mniej jest znanym język danego kraju wśród innych narodów. Wspomniał też prelegent, jak silnie rozwija się dążenie do przyjęcia języka tego w Azji, w Japonji zwłaszcza, wreszcie w Australji; zaznaczył, jak wielką jest łatwość jego wyuczenia się nawet dla ludzi nie znających obcych języków. Lotnik nie zna już dziś granic czasu ani przestrzeni, niedługo, gdy zaczniemy oblatywać w kilkanaście dni całą kulę ziemską, rozmowa z każdym narodowcem za pomocą jednego dla wszystkich wspólnego języka, stanie się niezbędną koniecznością. Odczyt został nagrodzony oklaskami przez wszystkich obecnych. Podnieść należy, że niektórzy z delegatów, mianowicie niemieccy i austriaccy zaznaczyli zupełną solidarność z poglądem prelegenta. Jest również godnem uwagi, że Dyrektor naczelny Międzynarod. Związku Lotników oświadczył, iż jeżeli mówimy o języku pomocniczym, możemy mieć wówczas na myśli tylko i wyłącznie język stworzony przez Dr. Zamenhofa, gdyż żaden inny nie potrafił zapewnić sobie tej powagi, ani nie ma tak obszernej literatury. Zaznaczył również, że nauka tego języka jest bardzo pożądaną dla wszystkich lotników.

ESPERANTO-MOVADO.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

Austrjackie Ministerstwo Handlu wydało oficjalnie własnym nakładem esperancki przewodnik po całej Austrii bogato ilustrowany.

Belgijska Policja zorganizowała nowy kurs esperanta dla swoich 40 funkcjonariuszy.

Holenderscy katolicy rozpoczęli wydawać swoją gazetę esperancką „Nederlanda Katoliko“.

Italscy (włoscy) kolejarze esperantyści organizują swój zjazd międzynarodowy w Turynie podczas Zielonych Świąt.

Szwedzka Robotnicza Organizacja Oświatowa wśród swych wykładów prowadzi obecnie przeszło sto kursów esperanta.

Węgierska Izba dla Handlu i Przemysłu wydała ostatnio wielorakie prospekty i ogłoszenia w języku esperanckim.

Slavo.

POLLANDA KRONIKO.

Kraków. Studenta Esperantista Rondo gastis dum kelkajn tagojn s-on inĝ. N. Giuroff, kiu pere de esperanto vojaĝas tra la mondo. S-ano Giuroff prelegis pri sia vojaĝo trifoje: 1. en Muzeo Industria (organizis Pola Esperantista Klubo k. Studenta Esperantista Rondo, tradukis s-o M. Ziomek), 2. en Kolegio de Sciencaj Prelegoj (tradukinto tiu ĉi sama), 3. per radiostacio en Krakovo (tradukis s-o Dro Dreher). Krom tio s-o G. havis dufojan prelegon pri esperanta movado en la mondo: 1. en la Universitato dum la inaŭgura prelego de esperanta kurso (tr. s-o Ziomek) kaj 2. dum kunveno de „Societo Esperanto“ (sen traduko).

Stud. Esp. Rondo organizis esperantan kurson, gvidatan de s-o T. Hodakowski, en kiu partoprenas 31 personoj.

„Societo Esperanto“ aranĝis la 15. II. kj. sian ĝeneralan kunvenon, dum kiu oni festis la 70-jaran datrevenon de naskiĝtago de ĝia prezidanto prof. D-o Odo Bujwid. Poste okazis balotoj kun jena rezulto: Prof. Bujwid — prezid., s-o Goldberger — vprez., s-oj Hodakowski k. Kutscher — sekr., s-ino Neuberg — kasist., s-ino Rosenthal-bibl., geanoj: s-ino Srebrna, f-ino Weinsberg, s-oj Dreher k. Leibel.

En Z. Z. K. (Profesia Ligo de Fervojistoj) finiĝis esperanta kurso por la anoj, gvidita de s-o T. Hodakowski.

KOMPATESPRIMO.

Krakova esperantistaro esprimas sian tutkoran kompaton kun: f-ino Weinsberg pro morto de ŝia Fratino,
s-ino Rosenthal pro morto de ŝia Bopatro,
s-o Fechter pro morto de lia Patrino.

Warszawa. La 25-an de februaro okazis ĝenerala kunveno de „Pola Studenta Esperantista Societo — Warszawa“ en loĝejo ĉe str. Leszno 99; kiel prezidanton oni elektis honoran membron de la Societo, s-inon E. Cense, kiu, malferminte la kunsidon, donis la voĉon al la prezidanto S-ro Trochimowski. Li legis longan raporton pri agado de la societo.

La plej grava ago de la societo estis organizo de diskuta vespero en la Universitato de Warszawa, pri kiu ni jam raportis.

Post tiu-ĉi diskuta vespero sukcesis al P. S. E. S. komenci dum vintra trionjaro en Varsovia Universitato prelegojn de prof. Bujwid pri artefaritaj lingvoj kaj Esperanto.

Oni elektis novan estraron jene:

Trochimowski (prez.), Pudiel (vic. prez.), Weinsteinówna (ĝen. sekr.) Kotlicki (sekr.), Nietupski (kasisto), kaj revizian komision: Wagnerówna, Maliszewska, Ferencowicz. Kotik.

Radom: Pola Esperanta Societo. La 7. 1. kj. prelegis s-o Bąbała pri Esperanto en loka Virseminario. Ĉeestis ĉirkaŭ 80 seminarianoj; estas aranĝita kurso por seminarianoj, kiun gvidas s-o Wlazłowicz. La 14. 1. kj. estis aranĝita kurso en „Państwowa Wytwórnia Broni“, kiun gvidas s-o Wojtas. La 1. 2. kj. estis aranĝita dancamuzo, post kiu estas malfermita kurso gvidata de s-o J. Wojtas.

Katowice: En la Societo de Esperanto-Amikoj okazis la 15. 2. kj. ĝenerala kunveno. Oni elektis novan estraron: S-ano Faruga prez., R. Zup

v-prez., M. Kloss sekr., W. Sołtysek kasist., Fr. Kania bibliot., Jan Tichawski kaj J. Strzelecki konsilantoj. En tiu-ĉi vespero ĉeestis kiel gasto s-ano inĝ. M. Giuroff el Bulgarujo, kiu vojaĝas jam de la jaro 1923. tra la tuta mondo, plejparte piede. Li faris prelegon pri sia ĝisnuna vojaĝo kaj la impresoj en la tramigritaj landoj. Kun aplaŭdo aŭskultis la ĉeestantoj tiun interesan paroladon.

Królewska Huta: La 19. 5. kj. faris Dro H. Broder propagandan paroladon dum monata kunveno de Związek Hallerczyków. La 21. 2. kj. vizitis la grupon s-ano inĝ. Giuroff el Bulgarujo. La 6. 2. kj. komenciĝis esp. kurso por. komencantoj en lernejo XII.; gvidas s-ro Kołodziej.

TRADUKA KONKURSO.

Traduku „La deka Muzo“ el Flanka Anteno de Bruno Winawer:

„Ponieważ zgadało się o kinematografie, zaznaczmy, że tak zwana dziesiąta Muza jest wogóle najukochańszem dzieckiem Techniki, która ją lat temu trzydzieści na świat wydała i odtąd obsypuje stale podarunkami. Nad artystycznym ulepszeniem kina pracuje dzielnie falanga świetnych aktorów, genialnych reżyserów — ale nie mniej liczna gromada pomysłowych wynalazców trudzi się na innym froncie, rozwijając tę dziedzinę sztuki technicznie. Gazety wiedeńskie sygnalizują jakiś nowy, fenomenalny wynalazek, zwany już dzisiaj „metodą Schuefftana“.

Trudno ze sprawozdań dziennikarskich wywnioskować, na czym właściwie owa metoda polega. Schuefftan — jak się zdaje — umieszcza przed obiektywem filmowego aparatu fotograficznego płytkę szklaną, nawpół posrebrzoną, która miejscami jest przezroczysta, miejscami zaś odbija światło, jak zwierciadło. Efekt jest ten, że aktor podczas zdjęć gra przed aparatem na zwykłym podwórku, a szyba rzuca jednocześnie na taśmę widoki górskie, wzburzone morza, kolumny greckie. Te cuda mogą być sfotografowane oddzielnie i kiedyindziej — na zdjęciu zobaczymy je razem z bohaterami dramatu. Przytem — w dowolnem powiększeniu, albo zmniejszeniu.

Metoda, która należy oczywiście do t. zw. „tricków technicznych“, otwiera podobno zupełnie nowe możliwości przed sztuką filmową. Pomysł nabyła już Ameryka, wynalazca, pan Schuefftan, bawi w Hollywood, gdzie jego genialnie prosty sposób ma być zastosowany w wielkim filmie „Podróż Gulliwer“.

Tri plej bonaj tradukoj estas premiotaj per libroj, kies titoloj aperos en la aprila n-o de P. E. La tradukoj, skribitaj legeble, estas sendotaj al Dro L. Dreher, L. K. La rezulto estos konigita en la maja n-o de P. E. Rajtas partopreni nur abonantoj.

Tradukaj konkursoj aperados en P. E. ĉiam en la n-oj marta, junio, oktobra kaj decembra.

La Redakcio.

ALVOKO.

S-anoj sekretarioj de esp. grupoj en Pollando estas petataj komuniki al mi la adreson de sia grupo, por presigi ilin en aperigota post ne-longe nova (III-a) eldono de Kompletny Podręcznik języka Esperanto.

*Dr. L. Dreher, Kraków,
Starowiślna 37.*

BIBLIOGRAFIO.

Tra Aŭstrio. Laŭ instigo de ĉefinsp. Steiner kaj dank' al konsento de sekcia kons. Deinlein el la Ministerio por Komerco kaj Trafiko en Wien, eldonis la nomita Ministerio je siaj kostoj 12-paĝan, ilustritan kaj arte presitan varban prospekton.

Petu ĝin senpage en Esperanto de Oesterreichisches Verkehrsbüro Wien I. Friedrichstr. 1.

ONI ALSENDIS AL LA REDAKCIO.

La Verda Lumo, januaro 1928., oficiala organo de Ŝangaja Esperanto-Asocio. Adreso: P. O. Box 1332. Shanghai.

NEKROLOGO.

La 6-an de februaro kj. mortis pro sekvoj de aŭtomobilakcidento, okazinta la 4-an vesp., s-ano Remigjusz Mączyński, bankprokuristo, multjara delegito de U. E. A. en aĝo de 39 jaroj. Esperantisto de 1911, la Mortinto partoprenis en vivo esp. kiel ano de Pola Esperantista Societo. Li estis homo noblanima kaj homama, do postlasas inter ĉiuj Lin konintaj veran kaj profundan bedaŭron. Al la forlasitaj Vidvino kaj Familio ni esprimas nian koran kondolencon!

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO“.

Por Garantia Fondo de „Pola Esperantisto“ pagis:

D-ro Rosenstock por I. — 10 zł. por II. — 10 zł. S-ino Neuberg por II. — 10 zł. S-ino Rubinstein por II. — 10 zł. D-ro Róbin por. I. — 20 zł. S-o Pęksa (Czarny Dunajec) por XI. 10 zł. por XII. — 10 zł. D-ro Dziedzic (Toruń) por VII. — 10 zł.

II. GARANTIA ĈENO DE „POLA ESPERANTISTO“.

1. S-o Jakób Lustig (Kalisz) pagas 2 zł.
 2. S-o Karol Ordyński pagas 2 zł. kaj alvokas pagi laŭvolan sumon s-inon Aniela Zychowicz (Bystra-Wilkowice), s-on Władysław Niżnik (Lwów) kaj S-on Antoni Wilk (Kraków).
 3. S-o Antoni Wilk pagas 1 zł.
 4. S-o Juliusz Pomorski pagas 3 zł. kaj alvokas pagi laŭvolan sumon: s-ojn Stanisław Essigmann, Mieczysław Kaus kaj Jan Günther (ĉiuj el Warszawa).
- !! VIVU SEKVONTOJ !!

III. NIAJ REPRESENTANTOJ EN KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo: en Katowice al „Societo de Esperanto - Amikoj“, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4; en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

NE FORGESU RENOVIGI VIAN ABONON POR „POLA ESPERANTISTO“. ĜI KROME BEZONAS MULTAJN NOVAJN ABONANTOJN! PRO TIO ANKAŬ VARBU POR ĜI!

II. TUTPOLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

KRAKÓW, 27 — 28 DE MAJO 1928.

NRO

ALIĜILO.

La subskribinto aliĝas al II. Tutpollanda Kongreso
de Esperanto en Kraków. Mi pagas por mia kongreskarto
la kotizon de zł. 5.—
antaŭpagas la loĝejon „
„ komunan tagmanĝon „
sumo zł.

Mi deziras loĝejon

Mi (ne) partoprenos komunan tagmanĝon..

.....
.....
.....

„Oni petas gesamideanojn, iam loĝintajn en Nord-Kaukazio, sciigi siajn rememorojn pri esperantista movado por kompili historion de ĉi-movado en Nord-Kaukazio.

Skribu: Esperantista Komitato, Poŝtovij jaŝĉik 82. Rostov/Don. Soviet-Unio.

Do nabycia:

LEO TURNO

W druku:

Kompletny podręcznik języka
Esperanto. Cena zł. 1.25
(z przesyłką zł. 1.50).

Wyższy kurs języka Esperanto
(dla zaawansowanych.) Cena
zł. 1.30.

Adres: Dr Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

Konto P. K. O. 405.716.

NIAJ KUNVENEJOJ.

BIĄŁYSTOK: Zamenhofa Esperanta Societo, ul. Kupiecka 49.
ĉiutage de 7—11 vesp. Biblioteko, legejo, klubo, kursoj.

DĄBROWA GORNICZA: Esperantista Sekcio ĉe T. U. R. ul. 3-go
Maja 14. ĉiudimanĉe de 3—7 vesp. kaj ĉiŝaŭde de 4—6 vesp.

KATOWICE: Societo de Esperanto Amikoj: monatkunvenoj —
4 Aprilo kaj 2 Majo kj. je la 20 h. en Grand Restora-
cio de S-o Naleppa ul. Kościuszki. Krom tio ĉiumerkrede
post la 20 h. ĉe gastotablo en la sama restoracio.

KRAKOW: Pola Esperantista Klubo, ul. Smoleńska 9. (Industria
Muzeo) ĉiulunde de 8—9 vesp.

Societo Esperanto, ul. Smoleńska 9. (Industria Muzeo, ĉam-
bro 130) ĉiulunde kaj ĉiumerkrede de 8—9 vesp.

KRÓLEWSKA HUTA: Rondo Esperantista: monatkunvenoj ĉiun
unuan ŝaŭdon en la monato en Dom Polski, ul. Wolności 64.
je la 8 vesp.; ĉiujn aliajn ŝaŭdojn en lernejo XII. ĉambro 12.
ul. Katowicka ekzercvesperoj por gejunuloj je la 6—7¹/₂
vesp., por membroj je 7¹/₂—9¹/₂ vesp.

WARSZAWA: Akademia Esperantista Rondo ĉe Juda Akademia
Hejmo: Nowy-Świat 21. tel. 404-29. Sekretariejo kaj bi-
blioteko ĉiudimanĉe kaj ĉiŝaŭde de 8—10. Ĉiusabate dan-
cadoj de 9¹/₂—2 nokte.

Esperantista Rondo „Konkordo“, ul. Marszałkowska 141. l. 17.
Tel. 194-01. Ĉiumarde de la 8¹/₂—10 vesp.

Laborista Esperantista Societo „Laboro“, Nowogrodzka 21.
ĉiumarde de 5—8 vesp. kaj ĉiusabate de 7—9 vesp.

Pola Esperanto Asocio, ul. Bracka 18 (oficina poprzeczna
l.p. lokal Związku Naucz. Szkół Średnich i Wyższych)
ĉiŝaŭde de la 7—11 vesp. Biblioteko, legejo, kursoj.

Pola Studenta Esperantista Societo, Leszno 99 m. 5. Tel.
198-37 ĉiumarde de 7-8¹/₂ vesp. kaj ĉiusabate de 8-10¹/₂ vesp.

LIBREJA FAKO

DE

POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS:

	zl.
<i>Albanio</i> . Gvidlibro	0.60
<i>Albumo</i> de l'VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot. 15.—	
<i>An-Ski</i> — Dibuk. Teatraĵo	1.25
<i>Bałucki</i> — Kuzeto. Komedio en traduko de S. Grenkamp	0.60
<i>Białystok</i> — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
<i>Blicher</i> — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
<i>Bujwid O. prof.</i> — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.—
<i>Bukedo</i> — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
<i>Bulthuis</i> — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
<i>Butin</i> — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
<i>Czubryński</i> — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.—
<i>Fredro</i> — Consilium facultatis. Komedio	1.50
<i>Grenkamp</i> — Krioj de l' koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig — Gdańsk eldonita de la P. E. D. Kraków 1927	1.50
<i>Jung</i> — La Alta Kanto de la Amo	1.80
<i>Kongreslibro</i> de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.—
<i>Kriss</i> — Melodioj de l' nokto. Poeziaĵoj	0.80
<i>Mickiewicz</i> — Improvizacio de Konrad	0.50
<i>Oberrotman k. Jung</i> — La lastaj tagoj de D-o Zamenhof	2.50
<i>Poŝtkartojesperantaj</i> ilustritaj, 10 diversaj. Bonega propagandilo	0.60
<i>Prus</i> — Peko de l' infaneco	1.20
<i>Rieck</i> — Oni ridas. Humoraĵoj	1.40
<i>Ŝlosiloj</i> esperantaj en 10 lingvoj (ankaŭ la pola)	1.—
<i>Turno</i> — Kompletny podręcznik Esperanta (II wyd.)	1.25
<i>Wiesenfeld</i> — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
POR SENDKOSTOJ ALDONU 10% — NUR ANTAŬPAGO.	

KRAKÓW, UL. SMOLEŃSKA 9.
KONTO P. K. O. 406.660.